

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## NPO 10-jara, Muzeo 4-jara



Karaj subtenantoj de nia organizo!

Nia “Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama” havos sian 10-jaran naskiĝtagon en la 23a de aprilo ĉi-jare. Ĝis tiam, nia organizo “Jokohama Esperanto-Rondo”, ekde 1968 agadis kiel grupo sen jura bazo. Aprobite de

la Urba Instanco de Jokohamo, ni akiris NPO-econ, t.e. juran bazon en 2015, kun devo pagi imposton, sed kun povo posedi domon je nia propra nomo.

En 2019, mecenato (kun nomo kaŝita) oferis grandan sumon al nia NPO, por ke ni povu fondi

### Sibayama Zyun'iti, reprezenta estrarano

muzeon. Komenciĝis serĉado de taŭga domo en 2020 (dum la kronvirotempo). En novembro ni trovis taŭgan domon 2-etaĝan kaj aĉetis. En la 23a de aprilo 2021, ni oficiale malfermis Esperanto-Muzeon Jokohaman, kaj ĝi iĝos baldaŭ 4-jara. Dank’ al donaco de libroj al ni, la Muzeo posedas pli ol 23 mil objektojn, kies du trionoj estas esperantaj gazetoj/organoj.

Nia nomo estas jam konata inter japanaj esperantistoj, sed nia plej granda celo, konigi ĝin al la civitanoj, estas ankoraŭ en komenca stadio. Ni atendas helpon de vi, legantoj-esperantistoj, por subteni nin de diversaj flankoj!

## Saluto el nova “vic-reprezenta estrarano”

### NAMBA Fumiharu

Jam raportinte en la 404-a Novaĵoj Tamtamas, mi estas elektita de nova “vic-reprezenta estrarano” de nia organizo Esperanto Jokohama.

Dum la kunsido de la estraranoj, nia reprezenta estrarano (fakte “prezidanto”) s-ro Sibayama opiniis ke iu juna rondano heredu la prezidan pozicion, kaj li nomumis min. Tamen, mi ne havas sperton prezidi iun ajn organizon, tial dum venonta periodo mi faros kiel “vic-prezidanto” en la organizo Esperanto Jokohama, por sperti diversajn aferojn por la prezidanto. Jen, nun mi volas (aŭ devas) saluti sur ĉi tiu gazeto kiel la “futura prezidanto”.

Nia organizo, aŭ nia rondo “Esperanto Jokohama” havas nur kelkdek membrojn, tamen, lastatempe junaj novaj membroj iomete multiĝas. Ne nur en nia rondo, sed ankaŭ



tra japana esperantujo, novaj junuloj multiĝas kaj aktivas bone. Eĉ iomete, mi sentas tiel.

Impreso pri Esperanto, aŭ fervoro pri lernado de diversaj alilingvoj, estas pli bona por nunaj junuloj ol por maljunaj generaciuloj. Mi amas babili drinkante en drinkejo kun junaj anoj, kaj ofte mi rakontas al ili pri Esperanto kaj tiaj diversaj spertoj (ekz. tra UK-oj). Tiam multaj junuloj vere interesiĝas kaj miras pri mia rakonto. Tiu tendenco de junula ŝatmaniero ŝajne pliiĝas dum kelkaj lastaj jaroj.

Nun, en nia organizo kaj tra esperantujo restas multaj problemoj. Tamen, por multaj diversaj problemoj, la plej bona kaj komuna solvmaniero

estas simple multigi lernantojn de Esperanto, kaj multigi anojn de nia esperantujo, t.e. esperantistoj. Jen ekzistas espero, multaj junuloj povas havi bonan intereson kaj impreson al Esperanto.

Mi volas provi diversajn agadojn en nia urbo Jokohamo, por ke multaj jokohamanoj eksci pri Esperanto, ekhavi intereson pri nia agado, eklernu la lingvon, kaj eniru en nian komunumon. Kaj krome, se ni sukcesos, ni povos disvastigi niajn spertojn kaj sukcesmanierojn al multaj Esperanto-rondoj tra Japanio, kaj tra la mondo.

Bonvolu helpi kaj subteni niajn pluajn ekprovojn. Dankon.

---

## La 134-a Legokunsido

---

En la 7a de marto 2025 okazis la 134-a legokunsido por “Abismoj” de Jean Forge. Partoprenis 5.

### Abismoj - Juna, verva verko de Jean Forge

Mizro Iwaya

Jean Forge verkis sume kvin librojn en Esperanto. Inter ili tiu ĉi “Abismoj” estis la unua kiun li eldonis en 1923, kiam li estis 20-jara. Li akiris diversajn famojn per siaj postaj libroj, sed tiu ĉi montras lian unikan talenton inter ili: nome ĝi estas strukture juna kaj verva, kvankam ĝi aperis antaŭ 100 jaroj. La aŭtoro mem diris ke li deziras produkti ian “novan verkon kiu plaĉas al nunaj legantoj” antaŭ 100 jaroj.

Li estis profesie filmreĝisoro. Tio signifas ke li sentive kaptas la guston de popolanoj. Lastatempe mi vidas multe da artistoj en TV, precipe dialogaj komedianoj. Multaj novicoj defias konkurson aŭ realajn scenejojn ĉiujare, kaj plejparto el ili malaperas en kelkaj jaroj. Mi scias ke la batalo por populareco estas severa. Do la venkintoj-restantoj spertis drastan ekzercon dum la konkurado. Ni vidas tiujn sukcesintojn en nia TV. Do ankaŭ Jean Forge certe havis severan sperton de konkurado kaj restis viva post tio. Kiam mi legas “Abismoj” kaj “La verda raketo” sinsekve, mi vidas ke li gajnis sentokapablon de popolanaj gustoj en sia profesio, ĉar la lasta havas pli da “plaĉemo”, kvankam iu nomis ĝin “sensenca sukeraĵo.”

Aperas en tiu ĉi libro jenaj kvar roluloj:

Ernesto Muŝko; bienposedanto en Karlovo  
Halino Borki; filino de najbara bienpose-  
danto en Nivi

Mateo Ardo; artpentristo

Zonjo Biringo; fianĉino de Mateo

Se ili havas ideale ordigitan karakteron, do nenia problemo okazas. Sed ili havas eksterordinaran karakteron. Halino Borki ŝanceliĝas inter Ernesto kaj Mateo. Dume Mateo ŝanceliĝas inter Halino kaj Zonjo. Ernesto ĵaluzas Halinon suspektante ŝian rilaton kun Mateo, dum li mem havas financan problemon. Tiamaniere la historio disvolvas sin plu ĝis lasta katastrofo, kaj subita transformiĝo, frapfinaĵo ... Precipe Ernesto ofte ekhavas inkubon kaj deliron. Ĉu tiel tordita estas lia menso? Kiam li eldiras malrealan deliron, mi tuj emas kredi ke tia malrealaĵo okazis ĉi tie. Fakte ne.

La strukturo de la novelo estas bone konstruita. Oni povas senpere ĝui ĝin. Rekomendinda al ĉiuj. Laste mi volas diri ke la nomo “Halino” pli bone sidas en la formo de “Halina”, ĉar ni jam konatiĝis kun alia fama Halina en esperantujo.

## “Abismoj” de Jean Forge

Sibayama Zyun'iti

Jen estas fikcio priskribanta psikajn abismojn de la roluloj, verkita antaŭ jarcento. La ĉefa scenejo estas ie en Eŭropo, kaj temas esence pri burĝetoj.

En la rakonto estas 4 ĉefroluloj (kaj unu alia prarolulo).

Unu el la ĉefroluloj Mateo estas orfo, tamen fariĝis sendependa artpentristo, kaj vojaĝis 2 jarojn eksterlande. Li revenas sian devenurbeton per trajno, kredeble de iu Urbego. Li, anstataŭ eliri de la hejmloka stacio ‘Kastelujo’, trodormis kaj eliris je stacio ‘Valo’, duonhoron fora. Nu, se la Urbego estus Jokohamo, ‘Kastelujo’ estus Hiratsuka kaj ‘Valo’ – Odawara?

Zonjo (mis prezentita kiel Zonfo en la enkonduko en la 2024-a eldono), geamanta kun Mateo, estas plej for de la abisma psikologio, nome amas Mateon, sed ne interagas kun la aliaj 2 personoj.

Halino, kun sia patro-bienposedanto loĝas proksime de stacio ‘Valo’, gastiginte Mateon, ekamas lin, kvankam ŝi longtempe geamikiĝas kun proksima loĝanto Ernesto. Sed mi ne opinias, ke ŝia flirta korŝanĝo estas ‘abisma’.

Ernesto, bienposedanto sed bankrotonta, tamen estas tro malŝparema. Li ludinta en la

Urbego diboĉinte, taksie revenas hejmen – hu, taksie de Jokohamo ĝis Odawara? Li geamikiĝas kun Halino, sed lia kaŝita intenco estas ŝia doto, pagota por senbankrotigo. Sed ŝajnas, ke Halino ekamis fremdulon Mateon. Nu, la koro de Ernesto estas plej abismohava.

Tiel progresas la rakonto, kie miksiĝas realo kaj fantazio kreita de la roluloj – jen povas esti bona filmverko eĉ hodiaŭ, se oni prezentos la profesion de la familioj Halino kaj Ernesto en moderna maniero ol la originalaj bienposedantoj. Povus esti vinberej-posedanto aŭ paŝtej-posedanto...

Alia interesaĵo de la libro: onomatopeoj kaj interjekcioj. La frazoj estas aŭtentike bonaj esperantaĵoj, sed foje enmetitaj esprimvarioj donas freŝan impreson al mi, leganto jarcenton-posta. Mi notas kelkajn el ili (per la paĝo de la 2024-a eldono).

(p.25) Brrrrr... for estas la aŭtomobilo.

(p.63) Pang... pang... pang... La pluvo pluvas...

(p.75) Mi gajnis la ludon. Huj! kia ludo!

(p.129) Mi leviĝas. Hop!

(p.138) Kaj la granda pendolo de la staranta horloĝo diras malrapide: “Hm-tik, hm-tak... li ne venis”

## Mia vojaĝo en Tsushima (2)

Landlima insulo kiu allogas koreajn turistojn

NAMBA Fumiharu

### Lui aŭton en Hitakatsu (比田勝)

En la suŝio-restoracio, fininte tagmanĝon de bonaj suŝioj, mi konversaciis kun la *itamae* (kuiristo de suŝio). Aliaj turistoj jam finis tagmanĝon kaj eliris, en la manĝejo estis kviete, tial la *itamae* multe rakontis diversajn aferojn al mi.

Mi konsultis kun la *itamae* pri mia vojaĝplano en Tsushima. Mi preferas lui aŭton, tamen mi ankoraŭ ne trovis bonan luaŭtejon. La *itamae* bonkore rekomendis iun ejon, kaj tuj telefonis al la manaĝero por certigi tiun servon. Bonege,

mi afable dankis al la *itamae*, kaj ekiris el la restoracio.

Tiu luaŭtejo situas najbare de haveno, kaj mi facile trovis. La reklampanelo kaj afiŝoj estis ĉefe skribitaj en hangulo, korea alfabeto. Evidente la luaŭtejo fokusas al koreaj turistoj.

Jen, mi luos aŭton morgaŭ, mi denove venu ĉi tien. Hodiaŭ posttagmeze post la manĝo, mi promenis la urbeton Hitakatsu, enhoteliĝis ĉi-vesperan Toyoko Inn (ja, ankaŭ en Tsushima tiuj hoteloj troviĝas ĉefe fokusante al koreaj turistoj), kaj vespere mi trinkis japanan sakeon



en loka *izakaya* (japanstila taverno). Ankaŭ en tiu *izakaya*, oni preparis menukartojn kaj afiŝojn en lingvoj ambaŭ japana kaj korea, kaj junaj geedzoj el Koreio ĝuis japanstilan vespermanĝon kaj drinkadon.

En la sekvanta mateno, la 8a de oktobro, elirinte hotelon mi denove iris al la luaŭtejo. La manaĝero kaj oficisto jam atendis, kaj mi tuj demandis pri la aŭto por mia vojaĝo. Tiam la manaĝero demandis.

“Bonvolu montri vian internacian kondukpermesilon.”

“Nu, mi estas japano!”

“Ho, pardonon.”

Ja, li miskomprenis ke mi estas koreo kiu lertas je japanlingvo. Kompreneble, estis senprobleme. Mi montris mian japanan kondukpermesilon, kaj li tuj preparis la aŭton.

La aŭto estas malgranda “*Suzuki Wagon R*”. Sur la aŭto, flavaj magnetaj signoj “国際免許” (internacia kondukpermesilo) estis metitaj ambaŭ antaŭe kaj malantaŭe. La manaĝero diris kun rideto.

“Vi havas japanan permesilon, sed mi rekomendas meti la signojn por sekureco. Aŭtoj de lokanoj ne tro proksimiĝas al tiuj aŭtoj kiuj havas la signojn.”

Jen, ĉio estas preta. Tamen, ankoraŭ ne! La manaĝero rememoris kaj diris.

“Pardonon, mi forgesis ŝanĝi la lingvon de aŭtonavigilo! Kutime ĝi estas en korea lingvo.”

Hura, mi uzos aŭtonavigilon en japana lingvo!



## Per aŭto, tra la insulo

Veturado tra la insulo Tsushima estis tre amuza. Mi vizitis jenajn vidindejojn kaj butikojn;

- **Korea observejo** (韓国展望所) : situas sur monteto de norda pinto de Tsushima. En bonvetera tago oni povas rigardi montojn kaj urbojn de Koreio. Tamen mi nenion povis trovi pro iom malbona vetero.

- **Loka superbazaro** “バリュータケスエ” : estas ĉefe por lokaj loĝantoj tra la norda parto de insulo. Oni traktas diversajn lokajn produktojn aĉetindajn. Ankaŭ koreaj turistoj ĝuas butikumadon, kompreneble mi ankaŭ aĉetis multe!

- **Sovaĝbesta Protektado-Centro de Tsushima** (対馬野生生物保護センター) : agadas por protekti sovaĝbestojn, ĉefe lokajn sovaĝajn katojn *Tsushima Yamaneko* (ツシマヤマネコ). Por la informado, unu sovaĝa kato Kanata estas prizorgita kaj publikigita tie.



En la insulo, buslinioj estas ne multaj, kaj busoj estas tre malmultaj kaj maloportunaj por viziti tiujn lokojn. Mi tre dankas al la aŭto, iom malnova “*Wagon R*”. Mi rekomendas lui aŭton por vojaĝi la insulon. De la norda urbeto Hitakatsu al suda urbo Izuhara, oni bezonas 3 - 4 horojn per aŭto.

Baldaŭ venos vespero. Antaŭ ol mi atingos la urbon Izuhara, mi veturigis aŭton al fama ŝintoa sanktejo Watazumi Jinja. Antaŭe, kelkaj ĵurnaloj raportis ke tiu sanktejo deklaris malpermesi eniron de koreoj. Tiam, tiu deklaro multe kaŭzis disputojn. Tamen, kiel estas reala situacio?

Mi parkis aŭton en la parkejon de Watazumi Jinja. Jen estis granda, kvietaj, kaj paca sanktejo. Vizitantoj estis malmultaj. La ĉefa vojeto de sanktejo, kun kelkaj ŝintoaj pordegoj *Torii*,



daŭras al marbordo kaj en la maron. Kaj... vere troviĝis afiŝoj, “Koreoj estas malpermesitaj eniri.” nur en korea lingvo. (Mi povas iomete

legi korean lingvaĵon.)

Mi iomete sentis malĝojon kaj enigmon. Laŭ la ĵurnaloj, la sanktejo atentigis ke multaj koreaj vizitantoj faris ege malbonajn kaj malĝentilajn agojn. Tamen, dum la vojaĝo mi jam rigardis multajn koreajn turistojn kiuj vere ĝuas kun feliĉa mieno. Kial, kaj kiel ili faras malbonan aferon en ĉi tiu kvieta loko?

Mi piediris en la sanktejon kaj preĝis antaŭ la ĉefa domo de sanktejo, por ke ĉiuj homoj, precipe ĉiuj vojaĝantoj en tiu insulo, povu esti kun granda feliĉo. Post la preĝo, mi ekveturis de tiu sanktejo al urbo Izuhara. Hodiaŭ mi tranoktos en hotelo Toyoko Inn en Izuhara. (daŭre)

## eĥo el Francio

### Saturno

Estimata Mizro Iwaya,

Mi ĝuis vian artikolon Vintraj Steloj en Novajoj Tamtamas! Vi kaptis la belecon de la vintra ĉielo.

Hazarde, mi estas vendisto de teleskopoj (vidu la foton) kaj se vi volas vidi Saturnon pli facile el via hejmo, mi povas doni al vi kelkajn konsilojn.

Kun simpla refrakta teleskopo de 70/700 mm kaj kromaj okuliloj de 6 aŭ 5 mm da fokuso (la elekto dependas de via buĝeto), vi povos malkovri la planedon kaj ĝiajn ringojn. Tio sufiĉas.

Tamen, en 2025, la ringoj de Saturno ne estos bone videblaj, ĉar la planedo estos klinita tiel, ke ni vidos ilin de la flanko. Ili estas tre maldikaj, do de nia perspektivo sur la Tero, ili preskaŭ malaperos! Pli bona jaro por observi ilin estos



2026, kiam la klinangulo denove ŝanĝiĝos.

Se vi havas demandojn aŭ bezonas pliajn konsilojn, mi volonte helpos.

Ĝis, kaj klarajn ĉielojn!

Sinjoro Marc-Olivier GRAZIANI

\*Esperanto Lyon

## sezonvorto aprila

### Violo スミレ

#### Okita Kazumi

Printempe, violo floras per profundviolkoloraj floroj ĉe vojflankoj kaj en arbaroj. Pro sia natura kreskado kaj koloro, ĝi estas konsiderata kiel modesta kaj nobla floro, tial ĝia floringvo estas “sincereco” kaj “humileco”.

En Japanio nature kreskas multaj specoj de violoj, do ilia aromo varias laŭ la speco.





## Danĝera kaj mizera situacio en Kongo DR

SUZUKI Keiichiro



Tre danĝera kaj mizera situacio pro teruraj bataloj en Kongo DR (Demokrati a Respubliko) aperas en artikoloj de ĵurnaloj kaj novaĵoj de televido en Japanio en ĉi tiu jaro.

Lastasomere en 2024 mi partoprenis en la Aruŝa UK (Universala Kongreso de

Esperanto) en Tanzanio. Tiam mi konatiĝis kun esperantistino el Kongo DR. Kontaktante kun ŝi mi unuafoje eksciis la situacion de Kongo DR. Ŝi nomiĝas Charline Buhendwa Tumusifu, kiu loĝas en la provinco Suda Kivu (urbo Bakavu) de la orienta parto de la lando. Ŝi estas flegistino, sed ĝis nun ŝi ne ricevis laboron kiel flegistino post la fino de studo en 2022.

Do mi prezentu ŝiajn paroladon kaj mesaĝojn, por ke vi povas scii realan voĉon de konga virino kaj la faktojn de la malbonega situacio.

Antaŭ la UK okazis la 2-a Afrika Kongreso de Virinoj de la 30-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Aruŝo. Ŝi partoprenis en ĝi kaj paroladis jene.

---

Saluton, karaj esperantistoj el la tuta mondo,

Mi estas ĉi tie por doni al vi mallongan paroladon: mia lando estas unu el la afrikaj nacioj, kiuj vivas en milito, masakroj, malsekureco. Pro ĉi tiu milito niaj fratinoj, niaj patrinoj estas seksperfortitaj, niaj infanoj fariĝis orfoj kaj virinoj restis vidvinoj, kaj niaj filinoj portas fruajn gravedecojn kaj niaj patrinoj trovas nedeziratajn gravedecojn pro la banditoj kiuj faras ĉion por malriĉigi la loĝantaron. Niaj gepatroj estas mortigitaj kiel ŝafoj sen kompatato. Vivo de homo estas vidita kiel tiu de moskito, ni vivas en timo kaj malespero ni vivas en la malboneco de armitaj viroj.

Estas tiom da infanoj surstrate, kiuj ne havas lokon por loĝi. Ili estas analfabetoj pro manko de rimedoj, ilia estonteco en malespero. La senkulpaj infanoj suferas de subnutrado pro manko de manĝaĵo.

Pro la intensa doloro sekiĝis niaj larmoj, ni komencis devigi nin vivi kun niaj vundoj, ĉar neniu parolas pri ni.

Jen kial mi venas al vi, por ke vi helpu min krei por paco, paco, ni volas pacon en DR Kongo. Mi diras: ĉesu la milito, ĉesu la malsekureco, ni bezonas pacon. Inter ni estas certaj homoj, kiuj travivis ĉi tiujn terurajn tempojn kaj kiuj vivas kun ĉi tiu doloro en la koro tial, se ni krias pri ĉi tiu malbona situacio en nia lando. Ni ne volas, ke aliaj homoj suferu la saman sorton, kiun la plimulto el ili suferis.

Mi tre dankas Esperanton, lingvon, kiu ekskludas neniun senrilate al via deveno, via raso. Esperanto estas por ĉiuj. Esperanto vivu eterne.

Dankon por via afabla atento.

---

<ŝia mesaĝo en la 31-a de januaro, parte>

Cetere, ĉi tie en nia lando okazas milito de la teroristoj nomataj M23, kiu inkluzivas ruandajn kaj ugandajn soldatojn. Ili invadis nian urbon. Ili estas tiuj, kiuj regas la urbon nun, niaj soldatoj fuĝis. La loĝantaro estas en krita situacio sen akvo aŭ elektro. Ni ne havas la elirpordon, ĉio estas blokita.

< ŝia mesaĝo en la 27-a de februaro, parte>

Mi volas nur informi vin, ke la M23-ribeluloj jam de kelkaj semajnoj okupis nian landon, la vivo fariĝas pli kaj pli malfacila kaj komplika. Foje la ribeluloj prenas niajn fratojn, ili kondukas ilin al nekonata loko. Nia vivo estas en danĝero, ni vivas en malespero. La 22-an de februaro, la ribeluloj mortigis 21 knabojn kaj patron kaj seksperfortis pli ol 6 knabinojn. Ni tiom timas.

RDF/M23/AFC-ribelantoj perforte rekrutas studentojn kaj instruistojn en lernejoj por aliĝi al la armeo. Kelkaj el ili eskapis pro timo esti torturitaj. Pluraj lokaj lernejoj decidis liberigi siajn studentojn post lerni ĉi tiun malbonan novaĵon. Se foje kamparano rifuzas aliĝi al iliaj armeoj, ili mortigas lin. Ĝis nun la ribeluloj daŭre minacas nin en ĉiuj lokoj. Paco mankas al ni.

< ŝia mesaĝo en la 12-a de marto, parte>

Miaflanke estas iomete bone kun malespero. Koran dankon pro via kompatato por mi kaj mia familio. [.....] La loĝantaro ne povas labori pro ĉi tiu milito, ĉi tiu estas la kaŭzo, kiu malfaciligas la loĝantaron

Eble iam ni vivos en paco, kvankam mi ne certas.